

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando. — Redakcio: JACA, provinco de Huesca. — Julio Mangada Rosenörn

III^a
JARO

NUM. XII. — DECEMBRO

1930



Internacia Stacio de Comfranc (Huesca)

NI ESTU SINGARDEMAJ

Kvankam vi estu leginta bone la artikolon «Jen la plano al vera laboro» de la numero IX-X de ĉi gazeto, mi atentigas vin por relego precipe de la teksto pri la eksigo el la Komitato de Kataluna Esperanto Federacio de S-roj. Valdepeñas, Campdelacreu, Anglada, Vila kaj Gorgues (paĝo 18^a al 20^a). Kaj por ke vi bone konsciuj pri tio, kion planas iuj, kaj pri kio ni devas esti singardemaj, ĉar tio celas detrui la tutlandan organizaĵon neŭtralan, H. E. A.'n, kiun ni havas, mi esprimos ree iujn ideojn ofte parolitajn de mi por refreŝigi faktojn.

Estas katalunoj mem tiuj, kiuj konstatas, ke *denove Kataluna Esperantista Federacio eniras la politikan vojon, sur kiu ĝi agadis, kontraŭ la neŭtrala bazo sur kiu ĝi staris, pro kio sufiĉe diras la teksto aludita*. De antaŭlonge, de la restarigo de la Kataluna Esper-Federacio (K. E. F.) kaŭze de la I^a Kongreso de la tutlanda esperantistaro en Barcelona, kiun organizis la Grupo «Fajro» (S-roj Rocamora, Anglada, Gorgues, Campdelacreu, k. t. p.), mi konstante kondamnis kaj agadis kontraŭ tia politika tendenco, klare elmontrita de la Komitatanoj kaj membroj (ne ĉiuj) de K. E. F. kaj de ĝia oficiala organo «Kataluna Esperantisto», sur kiu en kataluna lingvo aperis ABSOLUTE POLITIKA PROGRAMO DE K. E. F. Mi rimarkigas, ke mi ne agadas kontraŭ tiu politika tendenco utiliganta esperanton, ĉar mi opinias, *ke ĉiu homo rajtas utiligi esperanton por sia ajn tendenco*; kaj tial, ke Katalunoj rajtas celi sian politikan idealon per esperanto, ke ili, ekzemple, povas fondi specialan organizaĵon esperantan al tiu celo, ke ili, okaze de la Universalaj Kongresoj, povas organizi fakan kunvenon pri sia politika celo. Sed ankaŭ mi opinias, ke *ili ne rajtas maski sian idealon sub flago de neŭtrala organizaĵo esperanta, nek sin konduiti ĉe niaj neŭtralaj universalaj kongreskunvenoj tiel politike*, ĉar la regularo de niaj Universalaj Kongresoj postulas politikan, socialan kaj religian neŭtralecon, kaj ĉi neŭtralecon ĵus konfirmis la Internacia Centra Komitato de la Universala Esp-Movado per deklaracio tute klara. Ĉi tiu lasta vidpunkto estis, *estas kaj estos, kondamnata kaj atakata de mi*.

Mi atentigas la heaanojn rekonstatante, ke *ideo pri Konfe-*

deracio enkalkulanta Portugalujon akceptis kaj propagandis la K. E. F. kaj eĉ ĝin decidis en la Kongreso de Valencio por ĝin starigi en la Kongreso de Bilbao. Dume, la K. E. F., per pago de monsumo al la Tutmonda Esperanto-Organizaĵo (tute neŭtrala), trafas sian celon politikan ĉe la universala esper-movado neŭtrala: ke oni konsideru K. E. F.-n NACIA SOCIETO, kaj tial Katalunuĵon NACIO. Kaj ĉi tion konstatas dokumento de la K. E. F., rifuzante partopreni la starigon de la Konfederacio, ĉar ĝi atingis esti konsiderata NACIA SOCIETO.

Nun, oni diras, ke ree iuj kun la nova K. E. F. volas starigi tiun Konfederacion, kiu enkalkulos ankaŭ Portugalujon. Kial? Verŝajne la K. E. F. volas aperi NACIA ASOCIO kiel antaŭe, kiel elpruvas la partopreno de S-ro. Andres Piño (el Valencio) en Oxford, pri kio bonvolu relegi sur la 21^a-22^a paĝoj de la sept-oktobra numero de ĉi gazeto (artikolo aludita); kaj por tion atingi estas necese detrui la Hispanan Esperanto-Asociacion PER H POKRITA PROCEDO, PER ALIFORMIGO DE LA REGULARO KAJ MALAPERIGO DE LA ADJEKTIVO HISPANA. Bela revo de tiuj kiuj nenion faris al fondo kaj progresigo de nia nuna firma tutlanda organizaĵo neŭtrala! Mirinda sintenado kaj konduto de tiuj, kiuj ricevis la rifuzon de K. E. F. kaj hodiaŭ iras kun la rifuzintoj man-ĉe mano! Jen la celo tute klara gvidanta la Grupon «Frateco», ĉar tion ĉi asertas evidente cirkulero de unu el la konspirantoj kun S-ro Maynar, de S-ro Jiménez Mora, ĉar ĉi S-ro, dankante la katalunajn samideanojn, kiuj sin turnis al li esprimante sian simpatian al lia agado kontraŭ H. E. A. klare sopiras, ke la Grupo «Frateco» faros regularon favore al la dankatoj kaj al la dankanto kaj liaj samcelanoj spite de la volo de ĉiuj, kiuj subtenas H. E. A.-n.

Tial, mi esperas, ke ĉiuj lojalaj membroj de H. E. A. restadu pretaj ĝin subteni laŭ ĝi estas organizita, ĉar per la plano de la konspirantoj ni gajnas nenion, kaj ni perdas multon: ni eĉ ne gajnos Portugalujon, kiun ni neniel neniam devas celi gajni, ĉar Portugalujo estas memstara lando, kies Esperanto-Asocio same devas esti, okazigonte ĉe Esperantismo same, kiel okazas nuntempe kaj de iam antaŭe ĉe la matematika kampo, ĉe kiu la portugala kaj hispana Societoj pri Matematiko tute interkonsente agadas, okazigante siajn kongresojn aŭ kunve-

nojn ĉu en Hispanujo, ĉu en Portugalujo, kaj same ĉi tio sufiĉas por nia laboro. Ni perdos: ĉar estas malbona afero al asocio konstanta ŝanĝado de la organizo, super ĉio kiam ĝi sufiĉe firme staras kaj estas konata de la Registaroj kaj aŭtoritatoj inspektintaj kaj monhelpintaj ĝin; ĉar la nuna organizo, konsistente el individuoj por arigi ĉi tiujn laŭ granda aro, estas la plej simpla kaj lasas plenan liberecon al individuoj por arigi loke, regione, profesie, metie, ideale, laŭ plaĉo, sen altrudo ies, por agi esperante ĉe plej propra kaj kontentiga medio; ĉar migrado de la Prezidanteco, Vicprezidanteco, Sekretarieco kaj Trezoreco de loko en lokon, perdigos la konstantan kontakton necesan kun la Registaro, Institucioj, k. t. p., forgesante tiuj, kiuj celas la migradon, ke la Kongreso de Bilbao, konsciante esti necesa tiu konstanta kontakto, decidis starigi CENTRAN PARTON el PREZIDANTO, k. t. p., en Madrido; ĉar migrado de arĥivo kaj materialo de loko en lokon okazigos perdojn kaj neutilan elspezadon; ĉar estos altrudo al samideanoj dezirantaj resti sendependaj ĉe la tutlanda organizaĵo per plej alta kotizo; ĉar jam oni decidis kontraŭ K. E. F., kaj tial ke ĝi reinsistas daŭrigi la planon, kiu kaŭzis la punon, la kuniĝo (estu kia ajn) naskos aŭ povos naski suspekton, kaj estos ĉiam al ni danĝere iri kune kun tiaj politikaj tendenculoj; ĉar estas nefidinda plano la kuniĝo kun K. E. F. post ĝia rifuzo al sama kuniĝo je la Kongreso de Bilbao. Nu; ni, heaanoj, iru la esperantan vojon laŭ ni decidis por ni per la nunaj statutoj, kaj se necese en paco kaj konkordo laŭ voĉdonado ĝenerala ĝustatempe ni amendu aŭ ŝanĝu la statutojn, neniam plu atentante tion kion celas aŭ celos iuj, ĉar nur per reciproka batalado kaŭze de personajoj Esperanto perdas. Iru K. E. F. kaj ĝiaj sampartianoj laŭ sia dezirata kaj planita vojo, kaj iru ili pace. Tiel ni ne malhelpos unu la alian kaj Esperanto gajnos, kaj se ĉe H. E. A. estus malkontentuloj pro la nuna organizformo, ĉi tiuj eksigu kaj libere fondu novan organizaĵon, kies fondo ankaŭ ne malhelpos Esperanton.

Mi estis verkinta la antaŭon, kiam trafas min la julia-aŭgustata n-ro. de «Kataluna Esperantisto» sur kiu tuj mi legas artikolon «Pri Iberia Konfederacio», kiu mi transdonas, por plej

bona konscio de la heaanoj, kun mia komentario post ĉiu paraĝrafo:

«Nun kiam nia «Kataluna Esperantista Federacio» denove reprenas sian tradicion—longe forlasitan pro la hontigaj cirkonstancoj en kiuj vivis nia nacio dum ses longaj jaroj —, prezentigas al ni, katalunaj esperantistoj, problemo kies solvo urĝe devas esti serĉata. Nome, tiu pri la konfederaciigo de la naciaj esperantaj organizaĵoj ekzistantaj en Iberio».

La paraĝrafo klare vidigas, ke K. E. F. «reprenas sian tradicion»—naciismon per Esperanto, politikan celon—kaj konstatas la asertojn pri la tendenco politika de K. E. F. elmontritajn de la ekzigintoj per la cirkulero aperinta jam sur ĉi gaze-to. *La problemo, kies solvo tiel urĝas nun, ne urĝis je la Kongreso de Bilbao.* Por mi, kaj por la plimulto el la hispanoj la problemo estas solvita per H. E. A., ĉar ni atentis neniel naciecojn, kaj ni ne enmiksiĝas en aferoj eĉ esperantistaj de Portugalujo, krom tio, ni ankaŭ malatentas tian nomon Iberion, ĉar la atento al naciecoj kaj la enmiksiĝo estus perdi la neŭtralecon.

«Ke tiu afero estas gravega kaj urĝa, estas ja en la konscio de ĉiu kiu sin nomas esperantisto en la Iberiaj landoj. Unuiĝo estas fortigo; fortigo kunportas efikon kaj sukceson».

Kial K. E. F. rifuzis solvi en Bilbao la «gravegan kaj urĝan aferon? La esperantistoj de la hispanaj regionoj tute bone konsciis la aferon, kaj tial ili rapidis starigi la tutlandan unuiĝon, la Hispanan Esperanto-Asocion, kies pordoj estas malfermataj al neŭtralaj samideanoj de la tuta lando, kaj tial al la katalunoj de K. E. F., kiuj en la kongreso de Córdoba, kiam ni starigis provizore nian unuiĝon, per la voĉo de la aŭtoro de la artikolo mem, S-ro Domenech, nur salutis la hispanajn samideanojn same, kiel faris ĉeĥoslovaka samideano el Bratislava, kaj estas rimarkinde ke S-ro. Domenech kunportis por la malferma kunveno de la Kongreso deziresprimojn rompantaj la neŭtralecon, kiujn li legis al mi kaj al ĉeĥoslovaka samideano, pri kiuj la ĉeĥoslovako esprimis al li sian opinion pri lia malpraveco; kaj mi, mian malfavoran opinion, sed mian indiferentecon por la esprimado, konsciante ĉiujn liberaj por esprimi la penson. Pro kio, sendube li limigis sin fari la salutojn kaj fori-

ris tuj al Sevilla, *malprofitante la okazon por solvi la gravegan kaj urĝan problemon*.

«Sed, tial ke kelkajn fojojn dum malmulta nombro da jaroj malsukcesis la klopodoj de eminentaj katalunaj kaj eksterkatalunaj samideanoj, starigi Iberian Esperantan konfederacion, mi timas saman malsukceson en la nuna momento, se el inter la kataluna kaj eksterkataluna esperantistaro ne malaperos la malkomprenajoj ĝis nun apartigantaj la konfederaciigontojn».

S-ro Domenech kulpu sin kaj siajn eminentajn katalunajn samideanojn. ĉar ili rifuzis partopreni la laborojn de Bilbao kaj Córdoba al tiu celo. Sed sciuj ankaŭ (ĉio klare vidiĝas sur la broŝuro «Algo sobre el Esperantismo español» —petu ĝin al la Sekretariejo de H. E. A.), ke je 1909, la tiamaj hispana Asocio por propagando de Esperanto (tutlanda unuiĝo) petis al la tutmonda organizaĵo esperanta la Universalan Kongreson por Barcelono, kaj, post la Kongreso, la katalunaj samideanoj, eksiginte de la tutlanda unuiĝo, fondis sian apartan Federacion, eĉ ne plenumis sian devon al la Asocio pri la kalkuloj de la Kongreso; ke je la Unua Kunveno por starigi tutlandan unuiĝon en Barcelona (tiam ne ekzistis K. E. F.) tiuj, kiuj nun konscias gravega kaj urĝa la problemon pri unuiĝo kaj fortigo baris ĉiel la okazigon de la Kunveno ĝis la lastaj tagoj; ke la samaj katalunaj samideanoj aliris al la 11^a Kunveno en Zaragoza kun plano por frakasi la Kunvenon. Kaj estis mi mem, kiu dum ambaŭ kunvenoj per pure zamenhofa idealo sukcesis malaperigi la celojn al frakaso. Kial? Mi spertis, ke tiuj politikemaj esperantistoj ne ŝatas ekzistu tutlanda firma organizaĵo reprezentata ĉe la tutmonda esperanto-movado oficiale organizata, por, pagante iom da pesetoj, havi lokon inter la naciaj societoj, sen kontraŭstaro de nia tutlanda organizaĵo.

«Por helpi, laŭ mia povo kaj mia scio, al plena interkonsento de unuj kun la aliaj, jen mi volas nun elmontri kion mi farus se nur de mi dependus la serĉata solvo. Unue mi diros kion devus fari la katalunoj, poste kion mi farus estante eksterkataluno».

«Mi, kiel kataluno. antaŭ ĉio rekonas la fakton ke mia nacio apartenas ankoraŭ, laŭleĝe, al difinita ŝtato, kaj sekve de tiu rekono mi konkludus ke unuiĝo kun la aliaj samŝtataj espe-

rantistoj forte efikus la poresperantan laboradon, precipe en oficialaj rondoj. Eĉ, se tro malfacila estus la starigo de Iberia Konfederacio—ĉu pro neekzistado de organizaĵo en iu iberia nacio, ĉu pro aliaj kaŭzoj—, mi ne kontraŭstarus la fondon de hispanŝtata konfederacio».

Ni, en Hisp. Esp-Asocio, ne rekonas ion politikan, socian aŭ religian, nur estas atentinda-enda *poresperanta laboro*, kaj ĉi tio sufiĉas al ni, pro kio ni ne demandas al aliĝantoj ĉu ili estas *apartigistoj, komunistoj, kristanoj*, k. t. p., ĉar la heaanoj restas liberaj pri tiuj vidpunktoj por agado eĉ utiligante esperanton; do, S-ro Domenech, tial ke li «ne kontraŭstarus la fondon de hispanŝtata konfederacio» kaj tial ke ne estas necese fondi organizaĵon, ĉar jam ekzistas la firma H. E. A., aliĝu al ĉi tiu kaj faru same liaj sampartianoj, kaj ekster H. E. A. tute sendepende fonde ili peresperantan partian organizaĵon. Kaj ili atentu, ke sukcese, iom post iom, H. E. A. *efikas la poresperantan laboron tute bone en oficialaj rondoj*.

«Por mia sincera kaj entuziasma kunlaborado kun la eksterkatalunoj, mi nur proponus la akcepton *sine qua non* de tio, kion mi akceptus se mi estus ekster katalunano».

Ĉi paragrafo esprimas klare altrudon de principoj eksteraj al poresperanta laboro rompantaj la neŭtralecon; ĉi paragrafo starigas altrudon por eĉ multaj katalunoj mem, kaj la vera, facila kaj glata vojo al «sincera entuziasma kunlaborado» ne konsentas altrudojn, konsilas NEŬTRALECON. Kial, do, ne akcepti ĉi NEŬTRALECON?

«Se mi estus eksterkataluno, antaŭ ĉio rekonus:

Unue: La fakton, ke en la nuna hispana ŝtato ekzistas diversaj nacioj. Por ni, esperantistoj, la nacioj distingiĝas laŭ lingvoj».

Denove altrudo al la antaŭa rekono, kiu estas tute politika afero fremda je la poresperanta laboro; kaj estas altrudo, ĉar eĉ estas katalunoj mem, kiuj ne opinias same. Sed kiam starigis nacioj? Ĉu lingvo, raso kaj religio estas fundamentoj de nacioj? Ĉu nacioj persistados? Ĉu la homoj ne starigos la tutmondan frataron? Laŭ la eminenta tutmond fama franca sciulo Renan, nacioj naskiĝis kaj nacioj mortas, ĉar ilin absorbos quuiĝonta Eŭropo, k. t. p.; dum la mezepoko rajto de pugno kaj bato

aperigis kaj malaperigis la kvazaŭ naciojn, ĉi tiuj formigis de la komenco de la moderna epoko, kaj oni ne povas atenti, do, la mezepokajn kvazaŭ naciojn. Laŭ la sama sciulo, religio, raso kaj lingvo, ne estas fundamento de nacio; *nur estas firma fundamento de nacio la ĝenerala interkonsento de gentoj*, ĉar estas samlingvanoj kiuj apartenas al malsamaj nacioj; ĉar estas samreligianoj kaj samrasanoj ankaŭ apartenantaj al malsamaj nacioj; ĉar estas nacioj, kies nacioj estas el diversaj lingvoj, rasoj kaj religioj. Pro kio, S-ro Domenech kaj liaj sampartianoj konsciu, ke ili ne povas altrudi la unuan rekonon, ĉar ankaŭ esperanto venis «detruj la obstinajn barojn» kiuj ankoraŭ staras inter la popoloj kaj ne por restarigi la jam renversitajn: ĝi venis por restarigi la starigon de la tutmonda frataro vera. Ni ne povas tion rekonu, ĉar ni pekus rompante la neŭtralecon.

«*Due*: Ke tiuj diversaj nacioj rajtas organizi sian poresperantan agadon tute libere kaj sendepende. Apartenado aŭ neapartenado al enŝtata konfederacio, dependas rekte de ili kaj neniam neapartenado rajtigus la aliajn federaciojn aŭ konfederacion invadi la teritorion de la rifuzinta organizaĵo».

Hispana Esperanto-Asocio konsistas el individuoj, kaj kiel individuoj povas aparteni al ĝi aroj lokaj kaj regionaj; sed ĝi lasas plenan liberecon al individuoj por agi esperante loke, regione, profesie, politike, socie, religie k: t. p., ĉu izole, ĉu are, eĉ helpas la laboron laŭ eblo, ĉar ĝi starigas kaj konservas kun tiaj izoluloj kaj aroj konstantan interrilaton kiam la organizaĵoj estas neŭtralaj. S-ro Domenech atentu, estis K. E. F., kiu invadis teritoriojn valencian kaj balearan. H. E. A. efektivigas sian poresperantan laboron en la tuta hispana nacio.

Trie: Ke, sekve, la starigota konfederacio sin devus regi per regularo tia, en kiu klare kaj nepre estus deklarata tiu aŭtonomeco de la naciaj federacioj, en ĉiuj aspektoj, kaj en kiu estus evitata la ebleco de centralismo, kiu povus kunporti la danĝeron de diktatoreco de la organizaĵo aŭ individuo super la tuta konfederacio».

Ni ne povas, mi rekonstatas, rekonu naciecojn, ĉar tio ĉi estas politika afero fremda je la *poresperanta laboro*, rompanta la neŭtralecon kaj danĝero al la *poresperanta laboro*. Nia tutlanda, tutnacia Asocio, H. E. A., funkcias laŭ tute demokrataj

statutoj; estas konata kaj helpata de la Registaroj, kaj spite de ĉio iras antaŭen kaj efikas al disvastigo kaj oficialigo de Esperanto, kiuj estas niaj solaj celoj, en la *tuta nacio*.

«Mi tute sincere opinias, ke sur tiu reciproka interkonsento oni povus entrepreni la taskon realigi la Iberian Konfederacion, en plena konkordo kaj amikeco, kun la certeco pri sukceso kaj profito por Esperanto».

Tute sincere mi ankaŭ diras, ke ni ne bezonas entrepreni la taskon fondi novan organizaĵon ĉar ni jam havas ĝin; ke ni nur bezonas plibonigi, progresigi ĝin, por kio la hispanaj esperantistoj formantaj ĝin plenrajte laŭ ĝia regularo povas fari. Hispana Esperanto Asocio certe disvolvos sian taskon al disvastigo kaj oficialigo de Esperanto en Hispanujo, kaj ĝi ne baros laboron ies al sama celo.

Julio Mangada Rosenörn.

ZARAGOZO. HEROA URBO!

Ĉi tiu miriganta vizio nepre postulas la konvinkigon pri tio, ke *Goya*, filo de ĉi terpeco, estis tiel eksterordinara kolorigisto ĉar li, de la naskiĝo, de kiam li malfermis la okulojn, havis sub sia rigardo la pejzaĝon de Zaragozo kaj de ĝia produktoabunda vastega fruktoĝardeno. Antaŭ ĉi tiuj ravantaj kontrastoj de la grundo, antaŭ la granda argenta supraĵo de l' *Ebro* kaj de la proksimaj montaroj, li superregis la kolorscion, li majstris same pri delikataj koloroj, kiel pri la krudaj kaj fortaj. Li pentris la malvokolorojn, la laktoblankojn, la delikategajn rozkolorojn, tiel preskaŭ ne percepteblaj, ke lia pentroverko «*La Pradera de San Isidro*» (*La Herbejo de Sankta Isidro*) estas io mirinde aera kaj brila. Ĉe sia naskiĝurbo kaj ne en *Madrid*o, ĉe la bordo de la granda spegulo de l' *Ebro*, li havigis al si tiom da delikata majstreco.

Ravite ankaŭ de ĉi tiu sento, de ĉi tiu tuta orienta koloraro, mi revenas en la urbon kaj instinkte en la bordojn de l' *Ebro*, kaj mi trafas la ekstremon de la fera ponto situata ĉe la fino de l' *Coso*, la granda duoncrikla strato de *Zaragozo*, kontraŭ la

loko en kiu antaŭe staris la «*Puerta del Sol*» («*La suna Pordo*»). Estas la sesa horo vespere, la nokto ekvenas, kaj mi akcelas la iradon, ĉar dum ĉi tiu sezono la minutoj estas altvaloraj. Alveninte ĉe la mezo de l' ponto, rigardante en la sunkuŝejon, mi rigardadas kontraŭ mi la plej belan spektaklon, kiun eble neniam mi plu admiros. Laŭ mia konscio, nenio estas pli bela en *Zaragozo*; ĉi tiu aspekto estas la plej interesa el la urbo. Kaj por krei ĉi tiun belecon estas necesa la kunlaborado de la lumo—benata lumo, kiun eble nur oni povas vidi en *Luksor*



Alquezar (Huesca).

aŭ en la proksimaĵoj de la grandaj dunoj de l' *Saharo*—, estas necesa ankaŭ la kunlaborado de la arĝenta spegulo de l' *Ebro*, kiu kopias la belajn arĥitekturaĵojn mirinde situatajn, kaj kies kurba fluo rava donas karakteron kaj unikan nuancon al la tuta pejzaĝo. Ĉiuj ĉi tiuj ekceptaĵoj estas precizaj por krei la mirigantan belecon de la *Zaragoza* krepusko.

Revu, supozu vin sur la Ponto, inter la grandaj metalaj arkadoj, rigardante en Okcidenton. Antaŭ vi, jen ambaŭ bordoj de l' *Ebro* kun ĝiaj kajoj kaj malnovaj domoj sulkigitaj kun

antikvega aspekto, superega; en maldekstra bordo la malriĉa kvartalo *Arrabal*. Kontraŭ la antikva romana ponto, la ŝtona Ponto, tiom da fojoj rejunita kaj rekonstruita kun ĝiaj arkaĵoj malplialtigataj, ĝiaj grandegaj pilastroj, el kiuj iuj ŝajnas fortikaĵoj kun fenestroj kaj pafilendoj por defendi la bordojn, la Ponto kaj la malnovaj palacoj ruiniĝantaj, la tutaj konstruaĵoj el fumkolorigitaj ŝtonblokoj, la ruĝa minareto de *La Seo*, la magia aro el kupoloj de l' *Pilar*, kies akraj pintoj reliefigas intense nigre sur la ruĝa purpuro de la sunkuŝiĝo, imperia ruĝo, eksterordinara. kiu rememorigas la brilan tempociron de la vitraĵoj de *Bourgues*, kvazaŭ sango fariginta lumo, kaj ĉi tiu aspekto de ĉiela ensorĉo speguliĝas en la trankvila supraĵo de l' Ebro, kies lasta fono perdiĝas en puregan fundon, kies purecon kaj melankolion oni ne povas priskribi. Ĉi tio estas propra unikaĵo de la pejzaĝo, ĉi ĉirkaŭiro, ĉi kurba malrapida serena fluo de la akvo tiamaniere ke la rivero ŝajnas enflui en plenan ĉielon kaj la ombramaso de l, *Pilar* ŝajnas pendi de sur la Atmosfero... Kaj je tiu miriganta beleco paliĝanta, la sonoro de l' angeluso aŭdiĝas de unu en alian sonorilejon. Ĉarmega minuto, dume, tiu tuta mortanta lumo kvazaŭ reviviĝas tra la varmeta venteto venanta de malproksime. Poste, la silento, la nokto, la susuro de l' ondoj, la respeguliĝo de la luno en la rivero

Lucien Bertrand.

LA POEZIO DE HISPAN-ARABOJ KAJ ĜIA INFLUO EN
LA KRISTAN-HISPANAN KAJ EN TIUJN DE
ALIAJ SUDAJ POPOLOJ

(*Daŭrigo*)

Abubeque Mohamed Benyahya Benasaig Benbacha, nomata de la filozofoj *Avempace*, naskiĝis en *Zaragoza*, kaj preskaŭ ni povas certigi, ke li unue estis argentinisto, ĉar labori la argentinon estis la familia metio. Li vivis dum la epoko de *Almos-*

tain II^a, lasta reĝo de la dinastio *Beninud*. Kiam la *Almoravidoj* militkaptis *Zaragozon*, li trafis la estimon kaj konfidon de la gubernestro *Abentifilnit*, kiu lin decidis sia ĉefministro, kaj jam tian (ĉ. 1110) li estis fama kiel poeto, filozofo kaj muzikisto. Je 1116, du jarojn antaŭ ol *Alfonzo la Batalanta* (1118) konkeris *Zaragozon*, kiam mortis *Abentifilnit*, *Avempace* vojaĝis al Suda Hispanujo, kaj loĝis en *Almerio*, *Granado*, kie li havis literaturajn rondojn, en *Fez* (Maroko), kaj eble en *Jaen* (Ĥaen), dediĉante sian tutan tempon for de la politiko al instruado, verkado kaj publikigado de siaj verkoj. Li suferis teruran malamikecon de la kuracisto *Abulola Abenzoar*, de la fama literatura hlstoriisto *Abenjacan* (*Abenhakan*), aŭtoro de du famegaj verkoj *Mahmato elonfus* kaj *Oraj Kolringoj* (presita en *Konstantinoplo* je 1302—araba tempkalkulo—la unua, kaj en *Parizo* kaj *Bulac* la lasta je 1860 kaj 1867 respektive), kies literatura valoro estas ĉefa, tiamaniere, ke unu el liaj biografiistoj, *Abendiha*, priparolante pri liaj eksterordinaraj literaturkapabloj, diris: «Li estis cinika pro siaj kutimoj diboĉaj; sed lia parolo, lia dirmaniero por liaj verkoj estis pura kiel la ruĝa koloro de la tunikoj kal kiel la kristaldiafana kaj serena akvo de fonto», pro kio oni povas konscii la malamikecon ĉi lasta al *Avempace*. Ankaŭ *Abenasid de Badajoz* estis malamiko de *Avempace*, ĉar *Abenasid* estis disĉiplo de *Abenhacan*.

Avempace same, kiel la plimulto el la famaj mezepokaj pensumuloj, konis ĉiujn sciencojn de la greka enciklopedio. Estas li la plej antikva hispanaraba filozofo studanta la Aristotelan filozofion, utiligante la studojn de *Alfarabi*, *Avicena* kaj *Algazel*. Lia ĉefa laboro estis komentarii la verkojn de *Aristotelo*, ekzemple: la librojn *De audito physico*, parton el la libroj pri *Meteoroj*, pri *Generacio kaj malaltiĝo*, pri *Historio de l' animaloj* kaj de la *Plantoj*. Li verkis rimarkojn al la *Logiko* de *Alfarabi*; li interpretis la *Libron pri simplaj medikamentoj* de *Galeno*, kaj alian libron pri la sama temo de l' hispano *Abenguafid*, kiun multe utiligis *Abenalbeitar*; li imallongigis la gravan verkon *Kontinento* de la persa kuracisto *Arraci*.

Ankaŭ li verkis originale, kaj estas rimarkinda prelego pri demonstracio, alia pri la termino kaj la ideo, aliaj pri la *Elementoj* (Geometrio), pri Matematiko kaj Astronomio; la libro

pri la sola animo. studo pri la natura apetito kaj ĝia esenco kaj alia pri la impulsa potenco; *Adiaŭanta Letero*, libro pri la *kunigo de la intelekto kun la homo*, libro pri *Reĝimo de l' izolulo* k. t. p.

El lia abunda verkaro nur oni konservas la komentariojn pri la logiko de *Alfarabi* (Biblioteko de l' *Escorial*), kolekton el verkoj pri filozofio, medicino kaj naturaj sciencoj (B. de *Oxford* kaj *Berlin*), hebrean tradukaĵon de la *Adiaŭanta Letero*, kiun faris Juda ben Vives, kaj elĉerpitajn fragmentojn mallongigitajn el la *Reĝimo del' izolulo* hebree tradukitajn de *Moseo de Narbona* (XIV jarcento) je la fino de komentario de ĉi lasta por *Abentofail*, kiujn utiligis *Munk*.

La *Adiaŭanta Letero* celas restarigi la filozofiajn sciencojn kaj spekulacion, ĉar ili per si solaj povas konduki al kono pri la naturo kaj samtempe, per helpo dia, gvidas la homon koni sin mem kaj sin interrilatigi kun la aktiva intelekto.

Pli klare li celas solvi ĉi tiun problemon pri la unuiĝo de la animo kaj la intelekto aktiva per la *Reĝimo de l' izolulo*: «Li supozas idealan politikan ŝtaton, en kiu oni ne bezonas la tri klasojn el kuracistoj: de la korpo, ĉar la ŝtatanoj ne havas malvirtojn, kaj tiel kaj tial ili ne havas malsanojn; de la justeco, ĉar ĉiaj rilatoj inter la ŝtatanoj estos starigitaj sur la amo, kaj neniam estos diferencoj inter ili; de la animoj, ĉar la *izoluloj* estos perfektaj.» Por konscii kiajn *agojn homajn* povas konduki al la celo, *Avempace* klasigas ilin *animalaj* kaj *homaj*, laŭ oni efektivigas ilin instinkte aŭ kaŭze de volo devenanta de pripensado; preskaŭ ĉiuj de la homo estas el ambaŭ klasoj, kaj la *izolulo* devas celi por ke liaj estu pure homaj, per regado de la animo sur la instinkton kaj ke ĉi tiu restadu ĉiam al la servo de la racio por ke la izolulo fariĝu dia homo, donante celon al siaj agoj: perceptadi la spiritaĵajn formojn.

La fundamenta ideo, kiun *Avempace* alportas al la filozofia kampo, estas tiu pri la unuiĝo de la aktiva intelekto kun la homo, kiu estis la bazo de la panteismo de *Abentofail*, kaj kiun poste disvolvigis *Averroes*, de kiu enpaŝis en la Skolastikon. La famon de *Avempace* eklipsigis lia disĉiplo *Averroes*, ĉar ĉi tiu disvastigis multenombrajn doktrinojn de sia majstro.

Avempace verkis rimarkindajn versaĵojn, lam, okaze de la

morto de amiko, li restadis dum tuta nokto apud la tombo de la amiko, kaj sciante pro siaj astronomial konoj, ke tiu nokto mem la luno eklipsiĝos, li verkis du strofojn, kaj momentojn antaŭ la eklipsiĝo, ludante pasie kortuŝe sian liuton li kantis la strofojn kies hispanaj tradukoj de Asin estas la jenaj:

«Tu hermano gemelo
descansa en la tumba
y ¿te atreves, estando ya muerto,
a salir luminosa y brillante
por los cielos azules, oh, luna?
¿Por qué no te eclipsas? ¿Por
(qué no te ocultas,
y tu eclipse será como el luto
que diga a las gentes
el dolor que su muerte te causa,
tu tristeza, tu pena profunda?»

.....

«Jen, cia ĝemelo
mortinta jam estas;
kaj tamen tra la blua ĉielo
ci, lun', kuraĝas brile kun helo
trairi, dum senviva li restas.
Ci kial ne eklipsiĝas, malaperas,
ĉar tiel ci funebros kaj diros,
ke ci ja suferas
doloron akran, ke ci senesperas
ĉar ĉiam al li ve! ci sopiros?

Kaj li, antaŭsentante sian morton, improvizis versaĵon kies hispana traduko de Valera diras:

«Al ver que mi alma la muerte temía,
le dije: «La muerte, disponte a sufrir;
llamarla en las penas es gran cobardía,
más debes tranquilo mirarla venir».

«Ĉar animo mia timis la morton,
diris mi: «Estu preta ĝin ricevi;
ĉe l' sufer' ĝin voki montras malforton;
male, trankvile al ĝi frunt' levi».

(*Daŭrigota.*)

LA SKARABO KIEL SIMBOLO

Ĉi tiu insekto suferas tute perfekte kompletan metamorfozon de la ovo ĝis la krizalido de l' «*imago*» aŭ periodo de la plej alta perfektigo; kaj jen kial ĝi estas bona simbolo pri reviviĝo aŭ pri la evoluado de la Vivo en novajn formojn, same kiel la homo atingas post iuj cikloj de la Animo. La sfero kun flugiloj, komuna emblemo de la Egiptoj, estas la skarabo dum ĝia tria vivfazo pro la transdono de ĝia signifo al dia apliko. Krome, la kutimoj de l'skarabo liveras aliajn fundamentojn por ĝin uzi simbole.

La skarabino demetas sian ovon ĉe malgranda maso el fekaĵo; la skarabo kaj la skarabino rulas la mason entenantan la ovon sur seka tero ĝis kiam la maso estas sferforma, forta kaj bone formata. Ambaŭ koleopteroj gvidas tiun malgrandan mondon, kondukante ĝin sur krutaj deklivoj kaj malfacilaj vojoj, por kio unu tiras sur sin la sfereton dum samtempe la alia puŝas la bulon en saman direkton, helpante sin reciproke por la transportado de la malgrandeta mondo entenanta vivon. Tiel ili kondukas la bulon ĝis kiam ili trafas bonan taŭgan lokon por lokumi la mondeton. Tiam, la skarabino ekfosas per siaj kruretoj truon, kaj ĝi fosadas ĝis kiam ĝia instinkto diras al ĝi, ke la fosaĵo povas enteni la mondeton, kaj tiam ĝi eliras el la kavaĵeto, en ĉi tiun enpuŝas la bulon kaj ĉi tiun enterigas laŭ bezone.

La ovo kaŝas interne de substancoj elkovantaj kaj nutrontaj la novan estaĵon dum ĝiaj diversaj ŝanĝoj al perfektigo, kaj kiam ĉi tiu vivperfektigo atingas sian plej altan gradon aperas novan skarabon plian kiu ankaŭ iam rulos sperte sian bulon same, kiel prauloj rulis sian.

La historia vivo de ĉi insekto estas, do, mirinde bona ekzemplo, ĉar per ĝi oni spertas ke la plej malforta kaj humila ulo estas utila por beligi, instrui kaj simboligi la spiritecon kaj la plej grandan superecon, pro kio la Egiptoj tiom multe ŝatis ĉi tiun koleopteron. Ni imitu la kunlaboradon de la paro: iuj el ni tiru, sed la aliaj puŝu en la saman direkton de la tiro, por demeti la grandan mondon mirigantan de la «*Nova Sento*» fratiganta la popolojn en kondiĉojn de efektivigo; ni ne uzu niajn fortojn laŭ disiĝanta rezulto.

KALKULOJ DE LA KONGRESO DE OVIEDO

Ĝus min trafis la kalkuloj de la Kongreso de Oviedo kiuj estas transdonindaj por kono de ĉiuj membroj de H. E. A., kaj pri kiuj mi sekve faros rimarkojn por kiel eble plej bona konscio:

«VIII Congreso Nacional de Esperanto. Liquidación

Ingresos:

243	cuotas de	5	pesetas.....	1.215
2	»	9	»	18
2	»	10	»	20
20	cuotas de	15	pesetas	300
1	»	20	»	20
7	»	25	»	175
3	»	50	»	150
1	»	147,65	»	147,65
1	»	150	»	150
2	»	200	»	400
1	»	247	»	247
1	»	250	»	250
Con destino a la película. ⁽¹⁾				913,25
Para premios.....				25

(1) 3,25+15+20+25+50+800

Beneficio excursión Mayo.....	37,50
» » Covadonga...	63,50
Segundas cuotas para igualar ⁽¹⁾ ...	656,42
Suman los ingresos.....	4.788,32

(1) 1 de 2—3 de 5—1 de 10—4 de 30—1 de 29,42—1 de 35—1 de 485

Gastos:

Impresos ⁽¹⁾	401,75
Insignias ⁽²⁾	446,43
Pólizas y gastos escritorio.	28,60
Película ⁽³⁾	1.483,50
Viajes organización	64,15
Correspondencia y Aduanas ⁽⁴⁾	307,26
Fotografías y clichés ⁽⁵⁾	317,11
Exposición y premios.....	638,32
» muñecas y premios	212,25
Fiesta Orfeón.....	120,00
Fiesta Religiosa	180,20
Excursión Noreña	291,65
Ordenanzas, Conserjes y limpieza.	100,00
Devolución material escolar.....	30,30
Gastos de Gijón	16,80
» varios	150,00
Suman los gastos ⁽⁶⁾	4.788,32

(1) Impresos, circulares, id de adhesión, diplomas, kongres-kartoj... etc.

(2) Incluso entregados exposición de Gijón la de S. M. el Rey.

(3) Película y gastos de preparación y automóvil.

(4) Incluso referente exposición, recepción y envíos certificados, petición subvenciones según orden de H. E. A., remisión programas e insignias, teléfono y telégrafo.

(5) Copias y clichés para prensa, programas y sellos de propaganda.

(6) Los comprobantes están a disposición de TODOS LOS ESPERANTISTAS ESPAÑOLES.

NOTAS IMPORTANTES.—Este Congreso fué el octavo Nacional de Esperanto.

H. E. A. contribuyó con la cuota única de doscientas pesetas.

Merecen mención especial por su apoyo moral y material, el Excmo. Sr. Marqués de la Vega de Anzo, los Ayuntamientos de Oviedo, Gijón, Langreo y Teverga, el Orfeón Ovetense, las Cámaras de Comercio y de la Propiedad, la Diputación Provincial y el Ateneo de Oviedo, a quien pudiéramos considerar como verdadero organizador del Congreso

Oviedo y septiembre de 1930.

Luis G. Fernández.—Mario García.—Valentín Álvarez.—Mariano Cantalapiedra.—A. Jiménez.



Kastelo de Loarre (Huesca).

Al la *Rimarkoj Gravaj* antaŭe elmontritaj mi aldonos ne malpli *gravajn miajn rimarkojn*, kiujn devas tre bone atenti la membroj de H. E. A.

La Kongreso de Oviedo estis la 8.^a, jes, sed de Hispana Esperanto-Asocio, ĉar H. E. A., en sia Kongreso de Sevilla, unuanime voĉdonis la Kongreson 8^{an} por Oviedo, tial ke Ofi-

ciala Delegito de la oviedaj samideanoj kaj (mi opinias) de la Provinca Deputataro de Oviedo petis la organizón, kaŭze de antaŭaj tre aktivaj rilatoj de S-ro Jiménez Mora kun la Komitato de H. E. A., kaj tial ke ĉi S-ro., en Madrido interkonsentis tutan planon de la Kongreso, laŭ ĝenerala vidpunto, kun la Komitato de H. E. A. kaj kun la Komitato por la Kongresoj, kvankam poste la lasta S-ro., gvidanto de l' kongrespreparoj, volis agi sendepende.

La antaŭaj kalkuloj, do, devas esti prezentotaj al H. E. A. kun la kompleta atestantaĵaro, kiel ĉiam okazis de la momento kiam ni estis starigantaj H. E. An., kiel okazas analoge en la universala esp-movado, kaj tute same pri organizado kiel pri kalkuloj. Oni avertis S-ron. Jiménez Mora atenti bone ne elspezi pli ol supozitan enspezon por la organizado de la Kongreso, ĉar deficiton de Kongreso ne povas preni sur sin H. E. A., kvankam okaze de sumo supermezuranta la elspezojn, la sumo devos iri en la kason de H. E. A., kiel okazis pro la Kongreso de Sevilla, de kies kalkuloj la lasta sumo el la elspezoj «Mon-donaco al H. E. A. . . 80 pest.» estas la diferenco inter la elspezoj kaj la enspezoj. Kaj atentu bone, ke ĉi praktiko ne estas nova, ĉar, kiam ni fondis H. E. A., la samideanoj de Bilbao deponis en la kaso de nia Asocio sumon kaŭze de enspezoj supermezurantaj la elspezojn de la Kongreso tiea.

H. E. A. kontribuis kun la *unika kotizo da 200 pesetoj* por la Kongreso de Oviedo, ĉar tiun kotizon oni fiksas por tiu de Sevilla; *tamen oni promesis helpi ĉiel*, varbadi kongresanojn kaj aliĝojn de societoj, de urbaj institucioj, k. t. p.; tial la Centra Komitato esprimis al la Loka Komitato pro sperto por la Kongresoj de Madrido kaj Sevilla *inviti poŝtrekomendite, petante aliĝojn kaj subvenciojn*, pri kio aludas la 4.^a rimarko de la elspezoj dirante «*laŭ ordono de H. E. A.*» anstataŭ diri «*laŭ konsilo de H. E. A.*» eĉ por kiel eble plej frua invito kaj peto, sed la Loka Komitato ne bone atentis la konsilon kaj la sukceso ne akompanis la petojn, kiel ankaŭ ne bone atentis aliajn konsilojn pri varbantaj delegitoj, eĉ ne konstantan interrilatiĝon kun la sekretario de H. E. A., kiu tamen per sia persona laborado trafis por la Kongreso *pli ol kvardek aliĝojn el la 284*, sendante al la kaso de la Kongreso *sescent pesetojn*, kaj estas


ankaŭ rimarkinde, ke decidinte interkonsente difini 10 % el la kotizoj kaj monhelpoj atingitaj de la Delegitoj aŭ varbintoj por ĉi tiuj la sekretario de H. E. A, cedis la rajtigatan 10 % el la sumo de li sendita por la kaso de la Kongreso kvankam la varbado de li farita alportis al li poŝtelspezojn. Do, en la «*gravaj rimarkoj*» al legintoj la kalkulojn senpartia sintenado de la subskribintoj devis *mentii speciale* la sekretarion de H. E. A., S-ron. Mojado, kiu aligis al la Kongreso *pli ol kvardek kongresanojn*. Ankaŭ en tiuj «*gravaj rimarkoj*» devis aperi speciale menciita la Centro Cultural del Ejército y de la Armada de Madrido, kiun mi varbis kaj donis *centkvindek pesetojn*; same la Ministerio de Publika Instruado, kiu, dank' al mia laboro, donacis por premioj al Lernejoj partoprenintaj la Internacian Ekspozicion el infanaj laboritaĵoj luksajn grandvalorajn librojn. Same la redaktintoj de la «*gravajn rimarkojn*» forgesis menciiti eksterordinare la samideanojn de Gijón, kiuj havigis al la Kongreso la plej grandan solenegan fermon tre brilan, kiun oni povas deziri. Ankaŭ ili forgesis esprimi ke mi havigis al la ekspozicio el esperantaĵoj *tridek kilogramojn el afiŝoj, gvidfolioj, gvidlibroj, fotoj, reklamoj, gazetspecimenoj* k. t. p., ke mi faris la propagandajn artikolojn de la Kongreso aperintajn sur ĉi gazeto krom du aliaj por «*Heroldo de Esperanto*» (laŭ mendo de la Loka Komitato) kaj ke ĉi Komitato *ricevis ĉiumonate senpage por fari propagandon tiom da specimenoj de ĉi gazeto* kiom da ili la Komitato petis, k. t. p.

Fine, komparante la Kongresojn de Sevilla (sub kontrolo kaj gvidado de H. E. A. kaj ne barante iel la iniciativon de la Sevilla Loka Komitato) kaj de Oviedo (kies Komitato faris preskaŭ tute sendepende), oni konstatos, kiu estis plibone organizata:

Aliĝoj al la Kongreso de Sevilla.	391
» » » Oviedo.	284
Diferenco.	107

Enspezoj pro kongresanoj al Sevilla.	4177 ptoj.
» » » al Oviedo.	3992 »
Diferenco.	1085 »

Elspezoj pro la Literatura konkurso de Sevilla.	1300	ptoj.
» » filmo, premioj, k. c. de Oviedo.	1039,25	»
Diferenco.	260,75	«



Granda altaro. Preĝejo de la Kastelo
de Alquezar.

Atentu ke, en la enspezoj laste aperas «duaj kotizoj por egaligi» kun la sumo da 656,42 ptoj., kaj facile estas konscii, ke tiu sumo vidigas la *deficiton* de la Kongreso, certe pro la

filmo (kiu tamen estas tre laŭdinda kaj kies iniciativo aŭ konsilo por ĝin fari ankaŭ estis mia), kiun devas fari ĉiuj Kongresoj se eble (mi diras se eble, ĉar la samideano el Baracaldo, kiu faris tiujn de Madrid kaj Oviedo, ne povis fari tiun de Sevilla pro troa laboro. Mi diras, ke certe la deficito devenas de la filmo, ĉar ĝi kostis 1483,50 pesetoj, kaj oni enspezis por ĝi nur 913,25 ptoj., pro kio, la deficito pro la filmo atingas la sumon da 570,25 pesetoj, preskaŭ la tutan deficiton de la Kongreso.

Kaj de la komparo de la kalkuloj rezultas: I^a. Ke la elspezoj, pro dissendado de broŝuroj, cirkuleroj, poŝtelspezoj, dum 18 monatoj (ses monatoj pli ol por Oviedo) de la Kongreso de Sevilla, estis 224,86 ptoj., kaj tiuj de Oviedo estis 307, 26 ptoj., pro tio ekzistas diferenco da 82,41 ptoj., kaj kvankam oni devas konsideri, ke Oviedo pagis dogannelspezoj, tamen ĉi tio ne gravas por la konscio, ĉar Sevilla devis elspezi dum *ses monatoj* pli ol Oviedo kaj por 107 *aliĝintoj pli ol en Oviedo*; II^a. Ke la presajoj por Oviedo kostis 401, kaj tiuj por Sevilla kostis 265 ptoj, pro kio Oviedo elspezis 136 ptojn pli ol Sevilla; III^a. Ke la diservo en Oviedo kostis 180,20 ptoj, kaj en Sevilla nur 35 ptoj, kaj ankoraŭ oni povas elĉerpi el la komparo aliajn spertojn samcelajn por elpruvi, ke la interveno de H. E. A., absolute rajtigita de la statutoj de la Asocio, vidiĝas rimarkinde favora al organizo kaj disvolviĝo de la Kongreso sen atenco al la iniciativo de la Loka Organizanta Komitato, kaj ke la neintervenado aŭ nekunlaborado de la Loka Organizanta Kongreso kun la Komitato de H. E. A. estas malfavora al Kongresoj (mi rekonstatas, ke apenaŭ estis kontakto inter H. E. A. kaj la Loka Organizanta komitato de Oviedo: kaj tute male okazis por la Kongreso de Sevilla).

Certe, jam tute klare la samideanoj de H. E. A. konscios bone ĉu H. E. A. taŭgas aŭ ne taŭgas por nia esperanta celo per la faktoj pritraktitaj; kaj tial ke iuj membroj kaj eksmembroj de H. E. A. celas senkreditigi la komitaton de nia tutlanda Asocio. mi profitis la okazon por prezenti faktojn kaj ciferojn, kiuj klarege evidentege elpruvas, ke H. E. A. estas efika organizaĵo.

J. M. R.

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA ĜANĜIS KLUBEJON KAJ ADRESON

Nova kluba adreso estas nun. Esperantista klubo en Praha Kavárna «Louvre» Praha II, Národní tr, 20 a Ĉeĥoslovakio.

La kunvenoj okazas ĉiusemajne vendrede. La programo konsistas el prelegoj, kiujn parolas konataj gvidantoj de esperanta movado. Ĉiu vizitanto havas rajton diskuti kaj prelegi pri temo antaŭe anoncita al la komitato. Oni povas legi esperantistajn gazetojn de nia lando, fakajn gazetojn, revuojn kaj gazetojn de fremdaj landoj. Nia kluba biblioteko estas preta plenumi dezirojn de la membroj, ĉar ĝi enhavas pli ol 1500 esperantistajn librojn. La komitato informas ĉiun pri la stato de nia movado kaj pri lingva teorio de Esperanto.

Estas aranĝataj kursoj elementaraj kaj progresigaj. Oni havas eblecon aĉeti en nia klubo esperantajojn, librojn, insignojn, glumarkojn ktp. Ĉiu skriba demando adresita al la klubo estos respondita.

Ni invitas ĉiujn samideanojn de nia urbo kaj ĉiujn traveturantajn fremdajn esperantistojn al ni kaj ni esperas, ke al ĉiu certe plaĉos nia komforta klubejo kaj ankaŭ niaj programoj.

Komitato de la Klubo.

P E T O

S-ro P. Tarnow—Galkhausen b/Langenfeld. Germanujo-deziras aĉeti: la sepan jaron (1910-1912?), n-rojn 73-78. Numerojn 33 (1919), 44 (1920) kaj finon, de la gazeto «Hispana Esperantisto». Numerojn 3 kaj 5 de la 4^a jaro (1913), 6 ĝis fino de la 5^a jaro (1914), 9 de 1928, aŭgustan de 1929, de «Kataluna Esperantisto».

VORTOJ DE BLANKBARBULO

SEPA LETERO AL AMIKO

Kara amiko: Tia lingvo, vi diras, ĉiam nur estos tolerebla jargono sen ia ajn harmonio!

Kial do?

Antaŭ jaroj mi troviĝis kun tiam juna amiko D-ro. E. Privat sur la ŝipo, kiu traveturigas la Lemanan lagon de Ĝenevo al Laŭzano. Ni interparolis en Esperanto. Staris apud ni du Germanoj. Aŭdinte nin, unu diras germane al sia kunulo; «Ili parolas hispane». — «Ne, respondas la alia: itale». — «La italan mi scipovas rediris la unua, tio ne estas itala». Ili konkludis, ke ĝi sendube estas portugala! Tio pruvas, ke Esperanto tute simile sonas, kiel iu ajn el niaj naturaj—almenaŭ latindevenaj—lingvoj.

Ĝi estas harmonia! Alian pruvon mi ne donos ol jenan: Parolante pri Esperanto antaŭ junaj blindulinoj en Laŭzano mi diris kelkajn vortojn en Esperanto. Ili ekkriis: «Ho, kiel belsona estas ĉi tiu lingvo! Ĉu vi volas ĝin instrui al ni?» Nu, blinduloj havas tre delikatan kaj muzikeman orelon!

Ĉar tiu lingvo estas harmonia ĝi havas siajn poetojn. Certe poezio ne estas la celo de Esperanto, sed lingvo, kiu ne povas *ĉion* esprimi, povas nenion esprimi, kaj senpoezia lingvo ne estas efektive lingvo.

Oni rakontas—kaj eble ne tute aŭtentika estas la rakonto ke iun tagon oni parolis en pariza salono antaŭ la poeto Sully—Prudhomme pri la poezia lingvo. «Donu al mi, li diris katalogon de la fama firmo pri nutraĵo *Potin* kaj, uzante nur la vortojn en ĉi tiu katalogo, mi verkos soneton tiel poezian, kiel povas esti iu ajn alia!» Ĉu tion la poeto efektivigis, mi ne scias, sed liaj vortoj mirinde klarigas tiun aserton, ke lingvo kiu sufiĉas por komercisto, ankaŭ sufiĉas por poeto, kaj ke lingvo ne sufiĉa por poeto ankaŭ ne sufiĉas por filozofo, scienculo aŭ komercisto.

Lasta anekdoto: En Junio, kiam pomarboj estas kovritaj de floroj, patrino montris ilin al fileto, sed la knabo diris kun grumblema voĉo: «Kiaj floroj? Mi preferus pomojn!» «Mia filo, res-

pondis la patrino milde, se ne florus pomujoj, pomojn ankaŭ ili ne donus!»

Ne riproĉu do Esperanton pri ĝia poezio kaj ĝiaj poetoj. Nur ĉar ili estas eblaj, vi povas libere uzi kaj utiligi la lingvon por viaj diversaj laboroj kaj por via komerca korespondado.

Via Th. Cart

El «La Movado».



Interesaj rokoj el konglomerato. Riglos (Huesca).

EDIFANTA PARAGRAFO EL LETERO

«Afero pri la Regularo. Mi ĝin legis, ĉar ĝi venis de vi, ĉar alimaniere mi ne estus jam leginta plian Regularon. La diskutoj inter ni ne estas kaŭze de aferoj pri la organizaĵo, ili estas

kaŭze de personaĵoj. Kvamkam la Regularo estu perfekta, kun milo da reguloj por precizigi ĉiujn rajtojn kaj ĉiujn devojn, kaj ĉiujn interrilatojn kaj reciprokajn kondutojn inter la membroj, se la direktantoj ne sciis aŭ povus adaptigi siajn karakterojn kaj temperamentojn al tiuj de l' ceteraj, ĉio estus senfruktodona. *Nenia Regularo havas forton por devigi homojn al unuigo kaj harmonio de iliaj penadoj ĉe memvola entrepreno ideala.* Estas la memvola submetiĝo de la homoj al reganta ideo aŭ al homo, kiu vekas fidon, entuziasmon, admiron aŭ ion alian en la ceterajn. Ni ne havos Asocion ĝis kiam aperu inter ni homo trafanta aŭ kaptanta ĉiun el ni atentante liajn estimindajn kvalitojn kaj flankenlasante la malbonajn.. Tiel, do, kion mi diros al vi pri la Regularo? Nu, tion, kion mi same diras al samideanoj de Zaragozo pri ilia: Ke la Regularoj estas seninteresa al mi, dirite sincere kaj respekteme.

Fideluloj al la idealo, al la komuna laboro konstruanta, kreanta, progresiganta nian antaŭeniron al disvastigo kaj oficialigo de Esperanto, ni sekvu la vojon montritan de la verkinto: nur memvola disciplino firme enradikigita en la koroj kaŭze de nia ideala celo por profiti niajn estimindajn kapablojn estas atentinda; ni flankenlasu la disigantojn, ni ne atentu plu ilin kaj ni sekvu nian vojon laŭ dirite.

Heaano.

Je la memoro de F-ino. Amelio Mangada Sanz, kiu, je sia 27^a jaro, forpasis de ĉi tiu mondo en la Eternan Orienton, la 29^{an} de novembro de 1930.

ĈI TIU ARIZANTEMO ESTAS MIA!

La Tombejo, en kiun mi eniras, ne havas aspergilon kaj sonorilon. La mortintoj, kiuj en ĝi kuŝas, akceptas frate pace la alvenantojn, dum aŭdiĝadas la milda sono de la senfina «adia-

ŭo»! lasta kaj glitadas la ardantaj larmoj ŝprucantaj el la ruĝaj palpebroj de tiuj, kiuj ankoraŭ devas adiaŭi la karajn foririntojn.

Mi iras sur la plej larĝa vojo de la justiganta loko, kaj, sur la koton, mi vidas falintan krizantemon belan. Mi timas, ke iu piedpremu ĝin. Mi ĝin deprenas de sur la koto. Mi ĝin kisas kaj ĝin gardas profunde amsentante en la maldekstran poŝon de mia malvarma kaj malnova pluvsurtuto.

La belega kvazaŭ sankta floro estis unu el multenombraj, kiuj ornamis kaj parfumis la blankan funebroĉaron, kiu kondukis ĝis tiu glacia loko mian amikineton, kiun mi amis tiel fervore kiel oni amas la infanojn kaj la filojn.

Linera.

Madrido, 29^{an} de Novembro de 1930 (je la 4,30 horo posttagmeze).

* * *

NEKROLOGO


La 30^{an} de aŭgusto ĵus pasinta, mortis pro akcidento en atleta konkurso de subakvesplorantoj juna samideano entuziasma kvankam nova en nia kampo, S-ro José Bertrán Pauner. Li estis maristo de la submara militŝipo «B. 3» el la submara militŝipareto de l' Ferrol, kaj irinte al Cartagena por suferi ekzamenon kaj por altrangiĝi kaporalo, li tie bedaŭrinde trovis la morton. Li naskiĝis en Vinroma (Castellón) kaj estis grandanima junulo tre amata de ĉiuj. Nian plej koran kondolencon al lia familio.

KONSILOJ

La homo havas pli da rezisto fizika ol li men konscias havi. Dum la eŭropa milito multaj civitanoj, fariĝinte soldatoj, ĉe la

koto, rezistis mirinde kvankam ili kredis nepre necesa por sia vivo specialan viveĝimon.

La homo havas pli da energio morala ol li mem kredas posedi. Multaj belgoj, kiuj dum la paco estis tute vulgaraj, kun siaj malfortecoj kaj malbonaĵoj, fariĝis herooj kaŭze de la germana invado.




Gotika Katedralo. (Huesca).

La homo havas pli da intelekta energio ol li mem opinias havi. Pro tio neniam diru: «Ĉi tion mi ne povas lerni, ĉar ĉi tio estas tres malfacila al mi, neatingebla al miaj kapabloj». Celu studi tion, kaj ci cin konvinkos pri cia kapablo por lerni tion.

Tion, kion alia homo faras, ci iam povos fari, se ci decidus cian memvolon al la celo. Ci estas kvazaŭ diĝermo kaj nur dependas de ci men, ke cia evoluado estu pli-malpli rapida.

Ci portas en ci men trezorojn el fizika energio, el intelekta energio, el morala energio. Ci devas uzi tiujn trezorojn por la bono al ceteraj, ĉar tiel fari estas cia devo, kaj ĉar tiel fari estas la sola pero por pligrandigi tiujn trezorojn mem.

Ferdinando Redondo.



PRI MITOLOGIO

(*Daŭrigo*)


SATURNO. LIAJ. TITANOJ

Kiam Jupitero estis unujara, forta kaj kuraĝa junulo (la dioj kreskadas fulme), Titano sciis la ekzistadon de la genevoj, kaj arminte la Titanojn kaj ne atentinte ĉu Saturno estis kulpa aŭ ne, sin ĵetis en Saturnon, kiu estis venkata kaj katenigata. Jupitero sciis la okazintaĵon, ĉar la novaĵo penetris en la densan arbaron en kiu li loĝis, kaj sindoneme forgesinte la barbaran konduton patran, li sin decidis liberigi la patron. Helpate de Plutono kaj konsilate de la patrino, Jupitero ekbatalis Kampeon, kiu estis virinseksa monstro, gigantega raŭpo gardanta la malliberejon en kiu loĝadis la ciklopoj kaj centimanoj (ankaŭ nomitaj Hekatonkiroj), de kiam Uranuso enkarcerigis ilin. La Ciklopoj kaj Centimanoj, atinginte tial la liberecon, kuniĝis kun la liberiginto, kaj ĉi tiu ekbatalis kontraŭ siaj onkloj, kontraŭ la grandaj Titanoj. La militado estis terura, ĉar ambaŭ bandoj estis multenombraj, kaj por tion vidigi estas necese paroli pri la posteularo de la grandaj Titanoj.

Pro edziĝo de Oceano aŭ Saturno kun Tetiso, naskiĝis Riveroj kaj tri mil Oceanidoj: pro tiu de Ceoso kaj Febeo, naskiĝis Latono (Luno) kaj Asterio ankaŭ nomata Astarto; Kreio aŭ Krioso edziĝis kun Eŭribio, filino de Ponto kaj de Titeo aŭ Tero, kaj naskiĝinta post la katastrofo okazinta al Uranuso, fratino ŝi de Ceto, Nereo, Taŭmaso kaj Forciso aŭ Orko, kaj de tiu edziĝo naskiĝis Astreo. Palaso kaj Perseso aŭ Perseo. De Japeto kaj Klimeneo, lia amatino kaj unu el trimil Oceanidoj, naskiĝis Atlaso aŭ Atlanto, Menecio, Prometeo, Epimeteo kaj Hespero; Hiperiono kaj lia fratino, Thio naskis Helieson (Suno), Selenon (Luno) kaj Eoson, kiu personigas virseksen al Tagiĝon.

Tiuj estas la gefiloj, kiuj mitologiistoj atribuas al la granda Titatoj; tamen laŭ la landoj kaj tempoj, la poetoj atribuis al il multajn aliajn. Ni konigu la edziĝojn aŭ kunpariĝojn de la genepoj de Uranuso kaj la posteularon, kiun havis la plej famaj.

Atlaso aŭ Atlanto edziĝis kun unu el la Oceanidinoj, kun Plejono, kaj el ili naskiĝis la sep Plejadaj, kies nomoj estas:



Relikoj. Preĝejo de la kastelo de Alquezar.

Alciono, Asteropo, Celeno, Elektro, Maio, Meropo kaj Tajgeto. Sed de Atlanto kaj alia Oceanidino, nomata Etro, naskiĝis Hiaso kaj kelkaj filinoj nomataj Hiadoj, el kiuj ni citu Dioneon.

Astreo edziĝis kun Eoso, kaj naskiĝis la Ventoj kaj Fosforuso (stelo de la tagiĝo). Iuj opinias, ke Astreo kunpariĝis kun Heribeo, unu el primitivaj diinoj, kaj ke de ĉi tiu kunpariĝo naskiĝis la Astroj; de Palaco kaj Oceanidino nomata Estigio

naskiĝis Zeloŝo, Bio, Kratoŝo kaj Niceo; de Perŝeo kaj Esterio naskiĝis Hekato. Nereo, kuniĝinte kun alia Oceanidino nomata Doriso' havis kvindek filinojn, la Nerejdojn; Taŭmaso patri-niĝis Elektron. Tial naskiĝis Iriso kaj ĉiuj Harpioj; Forciso aŭ Orko patrinigis sian fratinon Ceton, kiu naskis la Nimfojn Hejon, Pefredon kaj Dimonon, la Titaninojn, kiujn oni nomis Gorgonoj, kies reĝino estis Meduzo, la Drako, kiu gardis la ĝardenon de la Hesperiidoj, kaj ankaŭ Escilon, Kariodion kaj Thooson.

De la sango de Meduzo, vundita de Perŝeo, naskiĝis Pega-so, ĉevalo kun flugiloj, kaj Kriasoro, junulo edziĝinta kun Ka-liroho, alia Oceanidino, kies gefiloj estis Ĥerjono kaj Ekidno. Ĥerjono estis la unua fama reĝo de la lando nomata Betiko (Andaluzio, an Hispanujo). Ekidno, kiu havis nimfan buston kaj serpentan korpon, kunpariĝinte kun la monstro Tifoo, nas-kis preskaŭ ĉiujn monstrojn de la mitologio.

Oni devas atenti, ke ĉiu aŭtoro formis posteularon de la Titanoj laŭ konveno por sia celo koncerne sian landon; tial ni akceptis tiun, kiu ŝajnas pli saĝa pro sia ĝeneraleco kaj sen-partieco.

ALTRANGIĜO

Nia malnova, kompetenta kaj entuziasma samideano, eksce-lenca S ro Karlo Bosch, atingis la altrangon de brigada gene-ralo, forlasinte tiel la komandon de la 23^a Infantería Regimiento «Valencia» por komandi la 2^a Brigadon de la XII^a Diviziono en Santander. Je la nomo de ĉiuj membroj de H. E. A., li akceptu la plej sincerajn gratulon kaj altestimon.

